

Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaudon la 29-an de septembro 2022 per Zoom

Ĉeestis

Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Lars Sandbakk, Claude Rouget, Marianne Lund.

1. Aprobo de la tagordo

Ni aprobis la tagordon.

2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 18-an de aŭgusto 2022

La protokolo aprobiĝis kun eta ŝanĝo.

3. Esperantonia

Stato: Du makleristaj pritaksoj indikas ke la vendosumo estus 2,5 milionoj. Du aliaj pritaksoj indikas ke la luvaloro estas 15.000 kronoj, kun aŭ sen la kelo. La municipo informas, ke dum la du venontaj jaroj ne eblos fari uzŝanĝojn en la kvartalo. Ne estos problemo daŭre uzi la ejon kiel «næringslokale», sed fari el Esperantonia loĝejon ne estus nun permesata. Ni havigis al ni informojn pri eventuala luo de oficejo en komuna oficejaro «Frivillighetshuset».

Daŭrigo: Ni detale priskribu kelkajn alternativajn solvojn en NE 1/2023 kiel preparon al la landa kunveno en junio. Bård formulos malneton de tia prezento ĝis la venonta kunveno (norveglinge, kun resumo en Esperanto). La prezentotaj alternativoj enhavu solvproponojn pri la tri ĉefaj funkcioj de nuna Esperantonia (oficejo, kunvenejo, stokejo).

Necesas plu esplori, kie povus esti estonta stokejo. Ni akiru superrigardon pri la kvanto da konservindaj stokaĵoj, post kio Lars esploru la prezojn de diversaj alternativoj.

4. Membroregistro

Lars prezentis plurajn alternativojn de nova membroregistro. «Spond» ŝajnas al ni aktuala. Tamen, Lars plu esploros ankaŭ «Styreweb», kaj ni konkludu venontkunvene.

Lars kontaktos Douglas por eventuale helpi al li fari adresetikedojn.

5. Retaj kursoj aŭtune 2022

De la 21-a de septembro ni okazigas du kvarsemajnajn, ĉiumerkdajn kursojn: por komencantoj (20.30-21.30) kaj por progresantoj (19.15-20.15). Marianne raportis pri la du unuaj vesperoj: La kurson por progresantoj sekvas du (tri) personoj, kio estas surprize malalta nombro, konsiderante la entuziasmon de la printempaj kursanoj. La kurso por komencantoj estas treege nestabila: Entute sep personoj kontaktis nin pri la kurso, sed el ili, pro teknikaj kaj aliaj problemoj, la unuan vesperon venis (eĉ nur partatempe) ne pli ol tri (kvar) personoj, kaj la duan – neniuj. Marianne petos firman respondon pri ilia intenco daŭre partopreni kaj daŭrigos la kurson nur se estos almenaŭ du kursanoj.

6. Vortaro

Neniuj gravaj novaĵoj, sed oni laboras pri la afero.

7. Eventualaĵoj

Neniuj

8. Venonta estrara interkonsiliĝo

La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 3-an de novembro je la 20-a horo.

Protokolis Marianne Lund